

# Fotografia terminaro

Eldonejo Libera

<b>Titolo</b>	Fotografia terminaro
<b>Aŭtoro</b>	Lode Van de Velde
<b>Reviziis</b>	Kalle Kniivilä kaj Yves Nevelsteen
<b>Eldonjaro</b>	2018
<b>ISBN</b>	978-0-244-67781-7
<b>Eldonejo</b>	Eldonejo Libera

## ANTAŬVORTO

La cifereca evoluo draste ŝanĝis la fotografian mondon. Kaj la analogaj kaj la ciferecaj teknikoj havas siajn specifajn vortojn, sed la nova cifereca evoluo ja kunportis novajn kaj donis novan sencan al la malnovaj, analogaj terminoj, aŭ eksmodigis iujn.

Ĉar la evoluo iras rapide, tiu ĉi terminaro neniam estos kompleta, sed ĝi ja donas superrigardon pri la plej uzataj fotografiaj terminoj.

### **Uzitaj mallongigoj**

i.a.	interalie
k.s.	kaj similaj
ntr.	ne transitiva
p.p.	precipe pri
t.n.	tiel nomata
tr.	transitiva

### **aberaci/o**

Disperso de la lumradioj, kiu kontraŭstaras la formiĝon de preciza bildo.

### **abstrakt/a**

Celanta ne la pli-malpli ĝustan reprezentadon de la realaĵo, sed nur la ludan (artan) kombinon de formoj, koloroj, k.s.

### **AF-punktoj = aŭtofokuso-punktoj**

La punktoj kiujn bitfotilo uzas por aŭtomate enfokusigi la objekton. Vidu ankaŭ: fokusareo.

**akr/a** = neta = malsvaga

Foto aŭ parto de foto estas akra kiam la konturoj en ĝi estas klare kaj precize videblaj.

### **akr/o/profund/o**

= kampa profundo.

### **akromat/a**

(P.p. optika lenso) Korektita pri la aberacio, kiun kaŭzas la kolora disperso.

### **akvomarko = filigrano**

Markigo de la (elektronikaj) fotoj per bildo aŭ subskribo por protekti ilin de kopiado au alia misuzo.

**analog/a** ↔ cifereca

La analoga, t.e. klasika maniero fari fotojn funkcias per kemia reago de filmo pere de lumo.

### **anastigmat/a**

(P.p. optika lenso) Senigita je astigmateco.

### **anastigmat/o**

Anastigmata objektivo.

**animaci/o** = movbildo

Optika iluzio, truko de movo kreata per sufiĉe rapida sinsekva montrado de statikaj elementoj.

### **antaŭ/rigard/il/o**

Parto de fotilo por vidi enhavon kaj limojn de la onta foto, ĉu per celilo (analoga fotilo), ĉu per ekrano (cifereca fotilo).

### **apertur/o**

La truo de objektivo, kiu permesas enlasi pli aŭ malpli da lumo tra la lenso, indikita per frakcioj, ekz.  $f/2.8$  –  $f/64$ . La simbolo 'f' estas la ĉefa fokusa distanco. Ju pli malgranda la cifero, ju pli granda la aperturo kaj do pli da lumo.

### **aplanat/a**

(P.p. optika lenso) Estanta de tia surfaco, ke ĉiuj lumaj radioj elirantaj el la sama punkto renkontiĝas ĉe la sama fokuso.

### **aplanat/o**

Aplanata objektivo.

### **aplanat/eco**

Eco de aplanata sistemo.

### **aplanat/ismo**

Aro da fenomenoj rezultantaj el aplanateco.

## **aplik/aĵo**

Programo, speciale en porteblaj aparatoj, ekzemple por pritrakti aŭ montri fotojn en sociaj komunikiloj.

## **APS = avancita fotosistemo** (APS = Advanced Photo System)

Sistemo kun magneta strio apud la klasikaj negativoj, sur kiun registras la fotilo aliajn informojn kiel la eksponaŭro.

## **arĝent/a halogen/ido**

Nomo por la lumsentemaj kombinaĵoj de arĝento kun halogenoj (kloro, bromo kaj jodo): arĝenta klorido, arĝenta bromido, arĝenta jodido.

## **ASA = usona normiga asocio** (ASA = American Standards Association)

Malnova usona unuo karakterizanta la sentemon de filmo je lumo. Nun anstataŭigita per ISO.

## **astigmat/a**

Havanta astigmatcon aŭ astigmatismon.

## **astigmat/eco**

Aberacio de optika sistemo, en kiu la bilda fokuso estas anstataŭata de du fokusaj strekoj, perpendikularaj inter si.

## **astigmat/ismo**

(Med.) Difekto de la okulo pro malegaleco de okullensa kurbiĝo, kiu estigas vidon neegale akran en ĉiuj direktoj.

## **aŭto/fokus/o**

Funkcio de fotilo kiu aŭtomate enfokusigas la objekton.

## **aŭtomat/a obtur/ilo**

Obturilo aranĝebla tiel ke ĝi faras foton en la ĝusta momento, ekz. kiam la mano de la fotisto estas tute senmova aŭ kiam iu ridas.

### **aŭtomat/a reĝim/o**

Agordo en fotilo, en kiu ĝi aŭtomate reguligas la ekspondaŭron, diafragmon kaj tiel plu; la fotanto devas nur celi kaj premi la butonon.

### **bajonet/a**

Maniero kunigi lenson sur estas kunigo per kunmetado kaj turnado

### **balg/o**

Regule zigzage faldita parto de aparato, veturilo, k.s., kunliganta du aliajn partojn aparte moveblajn, tiel ke oni povas ilin (mal)proksimigi, konservante la fermitecon de la internaĵo.

### **balg/o/fot/ilo**

Fotoaparato kun hermetike fermita balgo kiu ebligas la malproksimigon de la objektivo disde la korpo.

### **barit/paper/o**

Papero, ŝmirita per barita (kemie BaO) tavolo kaj uzata por specialaj laboroj fotografaj aŭ en presarto.

### **bateri/o**

Laŭ PIV: Grupo da elektraĵ piloj, pilaro.  
Praktike ofte uzata por indiki *pilo*'n.

**bikonkav/a** -> dukonkava

**bikonveks/a** -> dukonveksta

### **bild/o**

1. Videbla aspekto de lumigita objekto, sceno k.s., formita de la lumradioj devenantaj de ĝi. 2. Videbla aspekto de objekto, sceno k.s., reproduktita per fotado, filmado k.s. bild/angulo.

Angulo laŭ kiu objektivo vidas parton de la ĉirkaŭo.

**bildero** = rastrumero

**bild/manipul/ado** = trukado

**bild/stabil/igo**

Teknikoj kiuj kompensas moviĝon de la fotilo dum fotado por eviti malakrajn bildojn.

**birdo/perspektiv/o**

De tre alta starpunkto rigardante suben.

**bitfotilo** = cifer/eca fot/ilo

Fotilo kiu fiksas bildon per elektronika sentilo anstataŭ per analoga kartoĉa filmo kaj kemia procedo.

**bitok/o**

Grupo de ok bitoj, uzata kiel unuo en informadiko kaj kiu reprezentas unu signon.

**bludent/o**

Malfermita normo de sendrata komunikado inter elektronikaj aparatoj je mallonga distanco per radio-ondoj kun frekvenco 2,4 GHz.

**bril/a**

Tia ke ĝi resendadas vive helan lumon.

**BMP** = **bitmapo** (angle BMP = bitmap)



Rastruma bildo, de kiu por ĉiu pikselo aparte, la koloro estas difinita.

### **bru/o**

En cifereca fotografio la hazardaj punktoj kiuj aperas ĉe fotado en mallumaj cirkonstancoj pro fluktado en la baza signalo de la sentilo.

### **bru/o/redukt/o**

Funkcio de bitfotilo kiu ciferece reduktas la bruon en la sentilo.

### **bufr/o**

Parto de memoro kiu provizore stokas informojn (fotojn), kiam ne eblas tuj sekurigi ilin sur la memorkarton. Ekzemple kiam oni rapide faras plurajn fotojn sinsekve.

### **CCD = ŝargkoplita aparato** (Angle CCD = Charge Coupled Device)

CCD estas elektronika komponanto sentiva al la lumo. Ĉiuj el la miloj aŭ milionoj da pikseloj konvertas la lumon al analoga elektra signalo. Tiu signalo estas poste amplifita, ciferecigita kaj fine traktata por ricevi ciferecan bildon. La ŝargkoplita aparato estas do la baza komponanto de la ciferecaj fotiloj, ekvivalento de la fotografa filmo en arĝenta fotado.

### **cel/ilo**

Tiu parto de fotoaparato aŭ de kamerao kiu estas destinita por povi konstati kion oni estas fotografanta aŭ filmanta.

### **celoidin/o**

Speco de kolodio uzata en la fabrikado de la impresiĝema tavolo de fotografa papero.

### **centr/a obtur/ilo**

Lamena obturilo kiu kiel iriso malfermas la aperturon dum ekspono.

**cifer/ec/a** ↔ analoga

Funkciaanta per kvantoj, kiuj povas alpreni nur certajn difinitajn valorojn, nome la ciferojn '0' kaj '1'.

**cifer/eca fot/ilo = bitfotilo**

Fotilo kiu fiksas bildon per elektronika sentilo anstataŭ per analoga kartoĉa filmo kaj kemia procedo.

**cifer/eca fotografi/o**

Farado de fotoj per fotilo kiu uzas sentilon anstataŭ analogajn kartoĉojn.

**CMFN = cejana, magenta, flava, nigra** (angle CMYK = Cyan, Magenta, Yellow, Key / Black)

CMFN estas la nomo de kolormodelo uzata por komputilaj presiloj. Temas pri subtraha reprezento de koloroj, t. e. de koloraĵoj, kiuj ne lumas, sed post absorbo nur reflektas lumon.

**CMOS** (angle CMOS = Complementary Metal-Oxide Semiconductor)

CMOS, Komplementa Metal-Oksida Duonkonduktilo, estas unu el la du ĉefaj specoj de sentiloj en ciferecaj aparatoj.

**ĉefa fokusa distanco**

La distanco inter la ĉefa fokuso kaj la ĉefa malantaŭa ebena de objektivo. Oni ĝin skribas kiel  $f'$  aŭ  $f$ . La ĉefa fokusa distanco determinas skalon de la bildo kiam la objekto estas en malproksimo.

**ĉefa fokuso**

Punkto en optika akso de lenso aŭ objektivo kie lumo, envenanta paralele al la optika akso, krucas tiun akson.

**ĉiel/lumo-filtr/ilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon kiu malpliigas la UV-lumon kaj korektas troan bluan lumon, speciale en pli altaj lokoj.

### **detal/ig/eblo**

= distingivo.

### **diafan/a**

Trairebla per lumradioj, sed ne travidebla.

### **diafragm/i**

(ntr.) Plimalvastigi la aperturon de diafragmo.

### **diafragm/o**

Speciala metala plateto kun – ofte alĝustigebla – aperturo en la centro, kiun oni intermetas en la vojon de lumfasko, por limigi la lumgarbon kiu trakuras objektivon.

### **diafragmo/skal/o**

Skalo sur la objektivo aŭ videbla tra la celilo de fotoaparato, de kiu oni povas legi la uzatan diafragmon.

### **diapozitiv/o**

Pozitiva fotografaĵo sur travidebla bazo, kiu ebligas projekcion de la bildo.

### **difuz/ilo**

Aparato aŭ speciala ekrano por aliformigi la distribuon de la lumflukso de lampo; en studio uzata antaŭ lampo por mildigi ĝian lumfaskon.

### **difuzo filtr/ilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon (aŭ cifereca kromprogramo) kiu kreas pli difuzajn fotojn pro la revema efiko ĉu laŭ la tuta foto, ĉu nur ĉe la randoj.

### **diĝit/a**

Evitinda laŭ PIV, vidu: **cifereca**.

**DIN = Germana Instituto por Normigo** (germane DIN = Deutsches Institut für Normung)

Malnova germana unuo karakterizanta la sentemon de filmo je lumo.

### **dioptri/o**

Optika mezurunuo: konverĝebleco de lenso, kies fokusa distanco egalas unu metron.

### **dispers/i**

(tr.) Malkombini lumon, per refraktado en la diversajn kolorojn de la spektro. Kaŭzi disperson.

### **dispers/o**

Fenomeno konsistanta el tio, ke refraktiĝante, la fasko de blanka lumo malkomponiĝas en diverskolorajn radiojn.

### **dispers/a angul/o**

Angulo formata de ekstremaj radioj, kiuj iras ĝis la ekstretoj de la spektro.

### **dispers/eco**

La propra intenseco, kiun havas medio dum la okazo de disperso.

### **distanc/ek/ig/ilo**

Instrumento kiu funkciigas la obturilon de fotoaparato al kiu ĝi ne estas mekanike ligita.

### **distanco/skal/o**

Skalo sur la objektivo aŭ videbla tra la celilo de fotoaparato, de kiu oni povas legi la distancon inter la enfokusigita objekto kaj la filmo.

### **disting/iv/o**

= distingokapablo, la kapablo de fotilo aŭ alia sistemo aparte montri en bildo punktojn aŭ liniojn kiuj estas proksimaj unu al la alia. = detaligeblo.

### **distord/o**

Aberacio konsistanta el tio, ke bildo, kiu estas iom malproksime de la ĉefa akso de lenso aŭ de ne enfokusigita objektivo, estas kurbe reproduktata.

### **diverĝ/i**

(ntr.) Malproksimiĝi unu de la alia: diverĝaj radioj.

### **diverĝ/iga**

(tr.) Tia, ke ĝi malproksimigas la trairantajn lumradiojn unu de la alia.

### **diverĝ/iga lenso/o**

Lenso kiu diverĝigas. Ĉe tiaj ĉi lensoj, la rando estas pli dika ol la centro.

### **dubl/i**

(tr.) 1. Anstataŭi provizore iun pli faman aktoron, ĉu pro ties malsaniĝo, ĉu por evitigi al tiu danĝerajn akrobataĵojn aŭ nudscenojn.

(tr.) 2. Registri ĉe filmobendo novan strion, prezentanta la parolojn en alia lingvo kaj/aŭ aldona muziko kiu subtenu la filmenhavon.

### **du/konkav/a**

(P.p. lenso) Ambaŭflanke kava.

### **du/konveks/a**

(P.p. lenso) Ambaŭflanke konvekca.

**DX = cifereca indekso** (angle DX = Digital Index)

Kodo sur la klasikaj kartoĉoj dank' al kiu la fotilo scias la lumsentemon de la filmo en la kartoĉo.

### **edinol/o**

Kemiaĵo uzata por rivelbano.

### **eben/konkav/a**

= platkonkava.

### **eben/konveks/a**

= platkonkava.

### **ek/ig/il/o = ekponbutono**

Butono servanta por funkciigi la obturilon kaj en certaj aparatoj por fermi la diafragmon, ĝustigi la spegulon, ktp.

### **ekran/o**

1. Blanka tuko aŭ surfaco sur kiun oni projekcias luman bildon.
2. Elektronika komponanto por montri bildon kaj la diversajn agordojn de fotilo.

### **ekspn/i**

(tr.) Mekanike elmeti plakon aŭ alian impresiĝeman substancon al la luma efiko.

### **ekspon/o**

Ago de iu kiu eksponas.

### **ekspon/buton/o**

= ekigila butono

### **ekspon/daŭr/o**

Tempodaŭro dum kiu la lumo povas efiki sur lumsentema substanco, kutime mezurita en sekundoj aŭ onoj de sekundo. Ankaŭ “tempo de impreso”.

### **ekspon/mezur/ilo**

Instrumento per kiu eblas ekscii la precizan kombinson de ekspontempo kaj diafragma aperturo, kiu ĉe difinita filmspeco donos bone eksponitan bildon.

### **ekspon/prokrast/ilo**

Ekigilo kiu funkciigas la obturilon nur iomete (kelkajn sekundojn) post kiam oni premas la ekigilan butonon, ekz. por povi mem troviĝi en la foto.

### **ekstr/a fulm/o**

Uzado de la fulmo kiam fakte abundas lumo, ekzemple dum sunaj tagoj, por eviti ne-deziratan ombron, kiam oni fotas personon kies vizaĝo troviĝas en ombro.

### **ekstern/a fulm/ilo**

Fulmilo ne integrita en aŭ muntita sur la fotilo. Ĝi povas esti ligita per kablo, aŭ povas ekfunkcii kiam ĝi detektas la fulmon de la fotilo (t.n. 'sklava fulmilo').

### **elektron/a fulm(lum)il/o**

Fulm(lum)ilo kies fulmtubo (elektrontubo) enhavas jonigeblan gason (ksenono, kriptono). Post jonigo, ekbruligo donas tre fortan sed mallongan lumigon.

### **emerĝ/i**

(P.p. lumradio) (tr.) Eliri el medio, trapasinte ĝin.

### **emulsi/o**

Lumsentema suspensio de arĝenta halogenido kun protektanta emulsio da koloido en akvo kaj aliaj aldonaĵoj.

### **en/fokus/igi**

1. Alĝustigi lensaron ĝis certa objekto venas en la fokuson. 2. Alĝustigi la lenson de projekci-aparato ĝis kiam la ekrano sur kiun oni projekcias estas en la fokusa ebena kaj sekve la bildo estas akra.

### **et/bild/a fot/ilo**

= mal/grand/bilda fot/il/o

Fotoaparato kiu registras la bildojn sur 35 milimetrojn larĝan filmon.

**EXIF = interŝanĝebla bild-dosiera formo** (Angle EXIF = Exchangeable Image File Format)

EXIF estas normo por aldoni metadatumojn al bilddosieroj, uzataj de ciferecaj fotiloj. Kutime ĝi enhavas informojn pri la tipo de fotilo uzita, la eksponotempo, la aperturo, la fokusa distanco, la dimensioj, la dato de la kreado kaj tiel plu.



## **f**

Mallongigo por la ĉefa fokusa distanco.

### **fend/a obtur/ilo (fend-obtur/ilo)**

Obturilo kiu konsistas el du kurtenetoj aŭ dufoje 3 ĝis 5 lameloj kiuj rapide pasas antaŭ la filmo dum ekspono.

### **fiks/ban/o**

Kemia solvaĵo, uzata por forigi la restantaj lumsentemajn substancojn, post la rivelbano.

### **fiks/i**

(tr.) Forigi la restantaj lumsentemajn substancojn post la rivelado.

### **fiks/ilo**

Solvaĵo en kiun oni metas la lumsenteman tavolon post la rivelado kaj interlavado por forigi la arĝenthalogenidan reziduon.

### **fiks/ita fokus/o**

Fokuso kiu ne ebligas reguligo de fokusdistanco.

### **fiks/sal/o**

Materialo kiu post solvado en akvo formas fiksilon. Plej ofte ĝi estas natria tiosulfato ( $\text{Na}_2\text{S}_2\text{O}_3 \cdot 5\text{H}_2\text{O}$ ).

### **filigrano = akvomarko**

Markigo de la (elektronikaj) fotoj per bildo aŭ subskribo por protekti ilin de kopiado au alia misuzo.

### **film/boben/o**

Bobeno sur kiu estas volvita filmo, kun aŭ sen nigra papero, per kiu oni povas ŝargi fotoaparaton en plena lumo.

### **film/i**

(tr.) Fotografi sur kinematografan filmon: filmi dramon, komedion, scenon, konatan artiston.

### **film/kartoĉo**

Volvaĵo el filmo sur unu bobenkerno kaj kovrita de nigra papero, aŭ maldiafana cilindra ujeto entenanta la filmon. Post ekspono de la lasta peco oni devas revolvi ĝin, por ke oni povu elpreni la kartoĉon en taglumo.

### **film/o**

1. Bendo de nedefinita longo, el nitrata aŭ acetata celulozo, kovrita de fotoemulsio uzata por fotografado aŭ filmado.
2. Tuto de bildoj fiksitaj sur unu tia bendo, kaj projekciebla sur ekrano: ~ de Chaplin
3. Analoga bendo, de diversaj dimensioj, uzata en specialaj fotoaparatoj.

### **film/ten/ilo**

Tenilo destinita por teni la negativon en grandiga aparato.

### **film/ujo**

= filmbobeno = filmkartoĉo = filmkasedo

### **filtr/i**

(tr.) Traigi la lumon tra plato por ŝanĝi la spektran konsiston (ekz. haltigi certan koloron) kaj/aŭ la intensecon de lumfasko.

### **filtr/ilo**

1. Plato servanta por filtri lumon. 2. Plato muntebla sur la objektivon por modifi la aspekton de foto. 3. Kromprogramo kiu kiel fizika plato (sed pli vaste) ebligas korekti aŭ modifi la aspekton de foto (aŭ filmo), kiel ekz. heligi foton (aŭ parton de ĝi), forigi ruĝajn okulojn, k.s.

### **fin/lavad/o**

Lavado de filmo aŭ fotografaĵo en akvo post la fiksado por forigi reziduojn kiuj povus malbone influi la daŭran kvaliton de la bildo.

### **fiŝ/okul(a lens)o**

Lenso kiu aspektas kiel fiŝokulo, havanta tre grandan bildangulon.

### **flint/o**

Speco de tre refraktiga vitro.

### **flug/robot/o** = telestiraviadilo

Telestirata aviadileto kies piloto stiras ĝin defore, i.a. uzata de armeo, polico, sekretaj servoj kaj kapabla foti kaj filmi.

### **fluoresk/a**

Havanta econ fluoreski.

### **fluoresk/i**

(P.p. kelkaj diafanaj substancoj) (ntr.) Resendi laŭ pli longaj ondoj la ricevitan lumon, precipe la violan kaj ultraviolan; lumi dum la prilumigo.

### **fluoresk(ec)o**

1. Propreco fluoreski; prilumiga fosforeskeco. 2. Propreco videbligi la ultraviolajn radiojn.

### **fokus/o**

Punkto kie kuniĝas la radioj senditaj de unu lumfonto, post ilia traĵiro tra optika sistemo.

### **fokus/a brems/o**

Ciferecaj fotiloj permesas duonpremi la butonon por fiksi la fokuson (celante iun objekton) kaj poste ŝanĝi la celdirekton konservante la antaŭan fokuson. Tio estas tekniko por lokigi la koncernan objekton ne en la mezo; aŭ por fari ne-akran bildon.

### **fokus/a profund/o = akroprofundo**

= kampa profundo

### **fokus/are/o**

La areo kiun bitfotilo enfokusigas dum fotado.

### **fon/o**

Tio kio formas la malantaŭan planon de la bildo.

### **fosforesk/a**

Havanta ecojn de fosforesko.

### **fosforesk/i**

(ntr.) Lumi dum kaj post prilumigo per alia lumfonto.

### **fosforesk/o**

Fenomeno per kiu io fosforeskas.

### **fot/i**

(tr.) Fari bildojn de objektoj aŭ personoj per kemia agado de lumo sur impreseblan tavolon, sternitan sur vitra aŭ celuloidea plato aŭ filmeto, kun helpo de speciala aparato, nomata senluma kamero.

## **fot/il/korp/o**

La ĉefa parto de spegulrefleksa fotilo kiu enhavas la sensilon (aŭ en analogo fotografio la filmon), sen la objektivo.

## **fot/ilo**

Aparato, kapabla registri bildojn sur lumsenteman filmon aŭ per lumsentiva sensilo = fotoaparato.

## **fot/o**

Fotografajo.

## **foto/aparat/o**

= fotilo

## **fotograf/i**

= foti

## **fotografi/o**

Arto de fotografado kaj ĉiuj kun ĝi ligitaj laboroj.

## **fotogram/o**

La rezulto kiam oni atangas unu aŭ plurajn objektojn rekte sur lumsenteman paperon aŭ plakon kaj kiun oni poste eksponas al lumo. Jena procedo povas okazi kombine kun grandigo de kliŝo aŭ per nura lumo.

## **foto/gravur/i**

(tr.) Produkti per fotografa procedo gravuritajn kliŝojn.

## **foto/kun/igo**

Tekniko en bitfoto aŭ programo en komputilo por kunigi fotojn tiel ke ili aspektu kiel unusola foto. Ne konfuzu kun kolaĝo.

### **fotometr/o**

Aparato por mezuri la intensecon de la lumo.

### **foto/plaĉ/a**

Precipe pri personoj: havanta tian aspekton aŭ sintenon ke la porteto aŭ foto de tiu persono belaspektas.

### **foto/pres/ilo = foto/print/ilo**

PIV akceptas ambaŭ vortojn *presilo* kaj *printilo*.

Presilo/printilo kapabla presi/printi sur fotopaperon.

### **fototip/o**

Kliŝo, sur kiu la koloroj estas anstataŭitaj per punktoj kaj linioj, uzata por reprodukti fotografaĵon en presejo.

### **fototipi/o**

Procedo ebliganta ricevadi reliefajn kliŝojn, el kiuj oni povas reprodukti bildojn per presarto.

### **fulm/ampol/o**

Ampolo kiu donas tre fortan kaj mallongan lumigon de la ĉirkaŭo kiam ĝi estas bruligita.

### **fulm/o**

Mallongdaŭra intensa lumado por artefarite prilumi objekton.

### **fulm(lum)il/a ingo**

Ingo sur fotilo en kiun oni povas fiksŝovi eksternan fulmilon.

## **fulm(lum)il/o**

Aparato aŭ integrita parto de fotilo por lumigi objekton dum fotado.

## **fulm/kub/eto**

Aro de 4 fulmampoloj en malgranda kubforma ujeto.

## **fulm/tub/o**

= malŝarĝotubo. Fulmampolo aŭ fulmlampo en tuba formo.

**GIF = grafika interŝanĝo-formato** (angle GIF = Graphics Interchange Format)

GIF estas bildostrukturo, kiu estas tre populara en la T.T.T. La formo subtenas ne pli ol 256 kolorojn en bildo, sed ĝi ja subtenas movbildojn.

**giga~ = 10<sup>9</sup>**

Por klarigo de gigabitoko aŭ gigapikselo, vidu ĉe megabitoko aŭ megapikselo.

**GIMP = GNU\* bildo-manipulado-programo** (\*GNU = GNU ne estas Unikso)

(angle GNU = Image Manipulation Program) estas libera redaktilo por rastrumera grafiko, do ankaŭ fotoj.

## **grajn/eco**

Malfajneco de la pigmentoj de negativo, pozitivo aŭ bildo.

**grand/iga aparat/o** = grand/ig/ilo

Aparato per kiu oni laŭ optika vojo faras grandigon de negativo sur lumsenteman tavolon.

**grand/angul/a objektiv/o**

Objektivo kies bildangulo estas pli granda ol la normala; ĝi havas grandan kampopfundon.

### **grajn/o**

1. En analoga fotografio, la grandeco de la kolorpigmentoj aŭ arĝentaj partikloj. 2. En cifereca fotografio, la (truka) apero de partikloj en la foto.

### **griz/filtr/ilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon kiu malpliigas la tutan spektron de lumo por preventi superekspozonon. Ankaŭ nomata ND-filtrilo.

### **griz/kart/o**

Karto kun 18%-e griza koloro kiu permesas agordi la fotilon en ĉiuj cirkonstancoj (suno, ombro, elektra lumo) tiel ke la rezultaj koloroj aspektu ĉiam samaj.

### **halo/o**

Luma difuzo, kiu ĉirkaŭas la fotografan figuron de brilanta punkto ricevita sur impresebla plako.

**HD = tre distingiva** (angle HD = High Definition)

Normo por video kun granda distingivo = detaligeblo. Generale, video kun pli ol 480 horizontalaj linioj (Norda Ameriko) aŭ 576 horizontalaj linioj (Eŭropo) estas konsiderata 'tre distingiva'.

### **hel/aĵoj**

Partoj de bildo kiuj estas pli helaj.

### **hel/eco**

Atributo de perceptata koloro, pli precize ĝia intenseco.



**hel/igi**

Malpliigi la intensecon de la nigraj aŭ koloraj pigmentoj (kristaloj) kiuj konsistigas la bildon.

**hiper/fokus/a distanc/o**

Distanco de fokuso je kiu ĉiuj objektoj fariĝas akre videblaj ekde la duona fokusdistanco ĝis la senfina distanco.

**histogram/o**

Grafika reprezento de la kvanto da malhelaj ĝis helaj zonoj de foto, por kontroli la eksponon.

**horizonto**

Tiu loko en foto kie la ĉielo ŝajnas tuŝi la teron.

**impres/aĵo**

Latenta bildo.

**impres/i**

(tr.) Fari impreson, latentan bildon.

**impres/iĝ/ema**

Sentema je lumoj.

**impres/o**

Fizika efiko de lumradioj sur fotografa plako, filmo aŭ papero.

**incid/a**

(P.p. lumradio) Falanta en aŭ sur medion.

**incid/i**

(P.p. lumradio) (tr.) Trafi surfacon, ne penetrante ĝin.

### **infra/ruĝ/a film/o**

Filmo impresiĝema ankaŭ por parto de la nevidebla infraruĝa lumo.

### **inter/fokus/a distanc/o**

La distanco inter la centro de la objektivo kaj la ebena sur kiu formiĝas la bildo de senfine malproksima objekto.

### **inter/lavad/o**

Lavado de filmo aŭ fotografaĵo en akvo antaŭ la fiksado por forigi reziduojn solveblajn en akvo kiuj povus malbone influi la fiksadon.

**ISO = Internacia Organizaĵo por Normigado** (Angle ISO = International Organization for Standardization)

En analoga fotografio: internacia unuo karakterizanta la sentemon de filmo je lumo.

En cifereca fotografio, la sama unuo estas uzata similmaniere, sed por la sentemo de la sentilo je lumo.

**JPEG = Komuna Grupo de Fotografiaj Spertuloj** (angle JPEG = Joint Photographic Experts Group)

JPEG estas normo pri ciferecaj bildaj dosieroj kompaktigitaj, kiuj malkonservas negravajn detalojn por krei pli malgrandan dosiergrandon. Ĝi estas unu el la normoj por bildaj dosieroj en la T.T.T.

### **kablo/ek/ig/ilo**

Ekigilo provizita per kablo kiu preventas la moviĝon de la fotoaparato dum stativa fotado; aŭ kiu permesas mem troviĝi sur la foto.

### **kalejdoskop/a filtrilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon (aŭ cifereca kromprogramo) kiu pro la speciala ŝlifado kreas kalejdoskopajn fotojn, kiuj do konsistas el plurfoje la sama bildo unu apud la alia.

### **kamera/o**

Fotoaparato, kapabla registri certan nombron da sinsekvaj bildoj, laŭ regula ritmo, uzata por la kinematografio aŭ televido.

### **kamer/o**

1. Parto de aparato (ekz. kamerao) prezentanta fermitan spacon 2. = kamerao.

### **kamp/a profund/o = akroprofundo = fokusa profundo**

La zono laŭlonge de la optika akso de optika sistemo, en kiu la rigardanto ricevas la impreson ke la objektoj estas bildigitaj sufiĉe nete.

### **kartoĉ/film/o**

Cilindra kasedo kun filmbendo, protektita kontraŭ taglumo.

### **karton/kadr/o**

Kartona kadro malantaŭ kiu oni muntas foton, por bele prezenti ĝin.

### **kased/o**

Maldiafana ujo per kiu lumsentema materialo povas esti metita en fotoaparaton, kameraon aŭ alian eksponaparaton, ofte en taglumo.

**KD** = kompakta disko, lumdisko. (angle CD = Compact Disc)

### **kinematografi/o**

Tuto de la metodoj kaj procedoj uzataj, por fotografe reprodukti la movojn kaj eventuale la kolorojn kaj sonojn.

**klik/o**

Mekanismo kiu funkciigas la obturilon.

**kliš/i**

(tr.) Fari kliŝon de io.

**kliš(aĵ)o**

Fotografia negativo fiksita sur vitro aŭ membrano kaj servanta por fari pozitivajn kopiojn.

**kolaĝ/o**

Prezento de pluraj aranĝitaj kaj kunmetitaj fotoj.

**kolor/ekvilibr/o**

Agordo en bitfotilo por kompensi la malsaman aspekton de koloroj en diversaj lumaj cirkonstancoj (suno, ombro, elektra lumo, ...).

**kolor/igi**

(tr.) Kolorigi la nigran pigmenton de nigra-blanka foto, ekz. per bruna koloro; aŭ kolorigi la senpigmentajn partojn de foto.

**kolor/nuanc/o**

Unu el la tri ĉefa atributoj de perceptata koloro, aldone al heleco kaj koloropleneco kaj kiu estas priskribata per nomoj kiel "flava", "bruna", kaj tiel plu.

**kolor/ombr/o**

Nenormala ombra apero de certa koloro en bildo, ekz. pro malĝusta ekspozicio (kolortemperaturo) aŭ fotado kun elektra lumo (ekz. flava koloro), aŭ simple pro ombro en la bildo.

**kolor/plen/eco**

La denseco de la koloro.

### **kolor/temperatur/o**

La kolorotemperaturo de lumfonto estas la temperaturo de idealnigrakorpa radianto kiu radias lumon de komparebla nuanco al tiu de la lumfonto. En praktiko, la kolorotemperaturo (en kelvino) rilatas al la aspekto de la koloroj de objekto en malsamaj lumaj cirkonstancoj, ekz. matene, en sunplena tago aŭ sub volframa lampo. Modernaj fotiloj povas kompensi tion.

### **kompon/ad/o**

Aranĝo de la bildelementoj.

### **kondensor/o**

Optika sistemo el unu aŭ kelkaj konverĝigaj lensoj aŭ spegulsurfacoj inter lumfonto kaj bildigota objekto. Ĉe projekciilo la kondensoro direktas la lumon kiu trapasas la objekton, al la bildiga objektivo; ĉe mikroskopo ĝi krome havas la taskon lumigi la aperturon de la objektivo kiel eble plej intense, por ebligi grandan pligrandigon.

### **konekt/o/kabl/o**

Kablo kiu konektas la fulm(lum)ilon kun la fotilo aŭ la fotilon kun komputilo aŭ presilo.

### **konkav/a**

(P.p. lenso) Prezertanta konturon aŭ surfacon kavan, kiel la interno de resp. cirklo aŭ sfero.

### **kontakt/print/metod/o** = kontakt/pres/metodo

Farado de fotografiaĵo per rekta kontakto de la bildportanta kun la lumsentema plako, sen grandigo.

**kontakt/print/aĵ/o** = kontakt/pres/aĵ/o

Printaĵo farita laŭ la kontaktprintmetodo, t.e. kun rekta kontakto inter bildportanta kaj lumsentema plakoj, sen grandigo.

**kontrast/o**

1. Distingeblo de du aŭ pluraj objektoj unu disde la alia. 2. Diferenco inter la plej malhela kaj plej hela zonoj de foto.

**kontraŭ/lum/o**

Lumo venanta el la direkto al kiu oni rigardas, fotas aŭ filmas.

**konveks/a**

(P.p. lensoj) Prezentanta konturon aŭ surfacon elstaran, kiel la ekstero de rep. cirklo aŭ sfero.

**konverĝ/i**

(P.p. lumradioj) (ntr.) Esti direktitaj al unu sama punkto.

**konverĝ/iga**

Tia, ke ĝi direktas la trairantajn lumradiojn al unu sama punkto.

**konverĝ/igi**

Fari tiel ke lumradioj konverĝu.

**kopi/i**

Fari pozitivan fotografian bildon, ĝenerale sur papero, de negativa bildo sur filmo, aŭ de diapozitivo.

**krom/lens/o**

Aldona lenso muntebla sur objektivon por ŝanĝi ĝian ĉefan fokusan distancon kaj samtempe angulon de bildo de la objektivo. La lenso pligrandigas la registratan bildon (ekz. +1, +2, +4).

### **krud/a dosier/o**

Dosiero kiu enhavas ĉiujn informojn rekte venantajn de la sensoro.

### **kuv/o**

Ujo en kiu oni povas riveli, haltigi, lavi aŭ fiksi lumsentemajn plakojn.

### **lamp/o (por malluma ĉambro)**

Kolorita lampo aŭ lampo provizita de kolorita filtrilo por uzado en malluma ĉambro kaj je kies lumo la fotografaj plakoj ne estas sentemaj.

### **latent/a bild/o**

La tuto de ĉiuj ŝanĝoj en la arĝenthalogenido-kristaloj de fotografa emulsio, kiujn okazigas la ekspono de tiu emulsio = impresiĝo.

### **lav/ban/o**

La akvo per kiu oni lavas filmon, ĉu inter rivelado kaj fiksado, ĉu post la fiksado.

### **lav/i**

(tr.) Forigi per akvo (evt. kun rivelad-haltiga solvaĵo) rivelil-rezidojn post fotografia rivel-procedo.

### **LCD = likvokristala ekrano (angle LCD = Liquid Crystal Display)**

Ekrano kiu por vidigi bildon uzas polarizon de lumo de korpuskloj en likvokristala fazo. Tia ekrano troviĝas en plej multaj fotiloj por montri la agordojn kaj antaŭmontri foton.

**LED = lum-eliganta diodo** (angle: Light-Emitting Diode)

LED estas duonkonduktanta aparateto, kiu elsendas lumon kaj kiu denove fariĝis populara (kompakta kaj energiŝpara) lumigilo.

**lens/o**

Lentoforma disko el vitro, plasto aŭ kristalo, limigita de unu aŭ du kurbaj surfacoj, kaj havanta la econ regule deviigi la lumradiojn.

**lorn/o**

Optika tuba instrumento, kiu ebligas vidi malproksimajn objektojn, malpliigante ilian ŝajnan distancon.

**lum/bild/o**

Bildo ricevita per projekciado de diapozitivo.

**lum/disk/o** = kompakta disko (KD)

**lum/fask/o**

Aro da lumradioj = lumgarbo.

**lum/garb/o**

Aro da lumradioj = lumfasko.

**lum/gravur/o**

Arto gravuri helpe de la lumo. = fotogliptiko

**lum/sent/ema**

= lum/sent/iva. Tia, ke ĝi reagis al la lumo. Impresiĝema de lumo

**lupe/o**



Konvekso lenso, kiu montras tre proksimajn objektojn, grandigante ĝis ĉirkaŭ dekfoje (= grandiga vitro).

### **makro/fotografi/o**

Tiu parto de fotografio specialigita pri la reproduktado de malgrandaj objektoj.

### **makro-objektiv/o**

Lenso speciala por makrofotografio, kiu ebligas foti proksimajn objektojn.

### **mal/diafan/a**

Ne trairebla de lumradioj.

### **mal/grand/bilda fot/ilo**

= et/bilda fotilo. Fotoaparato kiu registras la bildojn sur 35 milimetrojn larĝan filmon.

### **mal/luma ĉambro**

Ĉambro izolita de la ekstera lumoj kaj destinita por la manipulado de lumsentema materialo.

### **mal/luma kamero**

Fermita senluma spaco interne de fotoaparato aŭ kamerao.

### **mal/ŝargo/tub/o**

= fulmtubo. Fulmampolo aŭ fulmlampo en tuba formo.

### **man/a reĝim/o**

Agordo en fotilo, en kiu la fotanto devas mem reguligi la ekspondaŭron, diafragmon kaj tiel plu.

## **mask/i**

1. (tr.) Forpreni parton de fotografe reproduktota bildo aŭ teksto per intermeto de maldiafana folio tiel malhelpante pason de lumradioj tra aŭ inter parto de la reproduktota originalo kaj la printo aŭ fotokopio.
2. Uzi helpdiapozitivan aŭ helpnegativon kune kun nigra-blanka negativo por altigi aŭ malaltigi la kontraston.
3. Uzi helpdiapozitivan aŭ helpnegativon kune kun la kolora originalo por korekti la kolorojn dum la farado de printoj.

## **mask/o**

1. Maldiafana folio el kartono, plasto aŭ metalo por maski, por ke sur la kopio aŭ printo aperu nur parto de la reproduktota bildo aŭ teksto.
2. Helpdiapozitivo aŭ helpnegativo uzata kune kun nigra-blanka negativo por altigi aŭ malaltigi la kontraston de fareda printo.
3. Helpdiapozitivo aŭ helpnegativo uzata kune kun la kolora originalo por korekti la kolorojn de la fareda printo aŭ kopio.

## **MB = mega/bit/ok/o**

1MB = 1 miliono da bitokoj (antaŭe  $2^{20} = 1.048.576$  bitokoj).  
Unuo por grandeco de foto- aŭ filmdosiero.

## **MP = mega/piksel/o**

La nombro da megapikseloj (ekz. 16) montras el kiom da rastrumeroj konsistas bildo. Ekz. 16 MP = 16.000.000 da pikseloj (rastrumeroj).

**mega~ =  $10^6$**

## **mem/fot/o**

Foto de la fotanto(j) mem, tre populara en sociaj komunikiloj.

## **mem/fot/a stang/o**

Stango kun ekspon-butono kiu ebligas fari foton de si mem (aŭ grupo) de pli granda distanco.

### **memor/ilo**

Ajna aparato al kiu eblas sendi kaj konservi datumojn, kiel ekz. lundisko, fulmmemorilo kaj memorkarteto.

### **memor/kart/o**

Malgranda karto kun en ĝi fulmmemorilo por registri bildojn.

### **menisk/o**

Lenso kun kaj konkava kaj konvekso flankoj.

### **mild/ig/ilo**

Kemia solvaĵo kiu renversigas la rivel-procedon ekz. por korekti superekspozonon.

### **Miniatur**

Reduktita versio de cifereca bildo por havi superrigardon ekz. en dosierujo.

**MMC = multimedia karto** (angle MMC = Multi Media Card)

Speco de memorkarto, malpli uzata ol SD-karto.

### **model/o**

Persono kiu pozas antaŭ artisto por ke tiu faru bildon.

**mov/bild/o** = animacio

Optika iluzio, truko de movo kreata per sufiĉe rapida sinsekva montrado de statikaj elementoj.

**ND-filtr/ilo** (ND = Neŭtrala denseco, angle Neutral Density).

Filtrilo muntebla sur la objektivon kiu malpliigas la tutan spektron de lumoj por preventi supereksponon. Ankaŭ nomata grizfiltrilo.

### **ne/bril/a**

Tia ke ĝi ne respegulas lumon.

### **negativ/a**

1. (P.p. bildo) Tia, ke en ĝi la nigraĵoj de la modelo estas prezentitaj per helaĵoj kaj inverse. 2. (P.p. lenso) Tia, ke ĝi malproksimigas la trairentajn lumradiojn unu de la alia = diverĝiga.

### **negativ/o**

1. Negativa (inversa) bildo. 2. Plako surhavante negativan bildon = kliŝo.

### **net/a**

= akra. Havanta bildpartojn abrupte transirantajn al pli helaj aŭ pli malhelaj partoj.

### **nigra-blank/a**

Konsistanta el nigraĵoj, blankaĵoj kaj ĉiuj nuancoj inter ambaŭ.

### **NiMH = nikelo-metalohidrida**

NiMH-pilo estas speco de reŝargebla pila (akumulatoro).

### **normal/a bild/angulo**

Tiu bildangulo kiun oni akiras kiam la fokusa distanco egalas al la diagonalo de la bildformato. Ĝi estas inter 44° kaj 53°.

### **normal/a objektiv/o**

Normala objektivo estas objektivo kiu havas ĉefan fokuson distancon proksimume egalan al la diagonalo de la bildo aŭ sensoro.

## **objekt/o**

Tio kion oni deziras registri per fotilo. Povas esti persono, aĵo aŭ pejzaĝo.

## **objektiv/o**

1. Parto de la fotografilo, konsistanta el unu aŭ pluraj muntitaj lensoj, kiujn devas trapasi la lumaj radioj antaŭ ol penetri en la malluman kameron. 2. Lenso aŭ lensa muntaĵo, kiu estas la plej proksima al la ekzamenata objekto, uzata por fari realan bildon de objekto en ebena kiu troviĝas je la flanko de la lensaro kontraŭa al tiu de la objekto.

## **obturator/o**

= obturilo.

## **obtur/ilo**

Parto de fotoaparato kiu reguligas la ekspontempon.

## **okulari/o**

Optike farita lenso, kiu direktas al la okulo la radiojn, kiuj iris tra la tuta optika instrumento.

## **ombr/aĵoj**

Partoj de bildo kiuj estas pli ombraj aŭ malhelaj.

## **panoram/a fot/o**

1. Foto de vasta vidaĵo (ekz. pejzaĝo). 2. Foto kun larĝeco pli granda ol kutime (pli ol 3/2).

## **paralaks/o**

Diferenco inter la bildo kiel ĝi aperas sur la ekrano de la fotilo dum fotado kaj la bildo kiel ĝi aperas post registriĝo, pro diferenco de distanco inter la objektivo mem kaj la celilo tra kiun oni rigardas.

### **paspartu/o**

Kutime kartona plato prezentanta rondan aŭ kvadratan kadron malantaŭ kiu oni fiksas foton por prezenti ĝin pli bele.

**PEC = punktoj en colo** (angle DPI = Dots per inch)

PEC estas ĉe cifereca fotografio la nombro da punktoj po colo, unuo de bildfajneco. Ju pli alta la nombro, des pli alta la distingivo.

### **pejzaĝ/o**

Bildo reprezentanta pejzaĝon.

Agordo en fotilo (i.a. aperturo) por optimumigi la fotadon de pejzaĝo.

### **perspektiv/o**

1. Prezento de objektoj laŭ la diverseco de aspektoj kaŭzitaĵ de ilia malproksimeco kaj pozicio. 2. Aspekto kiu prezentas, rilate al la punkto de kie oni rigardas, objektoj vidataj en la malproksimo.

**piksel/o** = bildero = rastrumero

### **pil/o**

Fonto de elektra energio por funkciigi fotilon, kiu kutime funkcias per transformiĝo de kemia energio.

### **plat/konkav/a**

(P.p. lenso) Kiu estas plata je unu flanko kaj konkava je la alia.

### **plat/konveks/a**

(P.p. lenso) Kiu estas plata je unu flanko kaj konvekso je la alia.

### **plene HD = plene tre distingiva**

Normo por video kun pli granda distingivo ol normala HD, nome 1080 horizontalaj linioj.

### **PNG = portebla reta grafikaĵo** (angle = Portable Network Graphics)

Kompaktigita bildformato kiu konservas pli da bildinformoj ol GIF kaj kiu pro tio populariĝis en interreta uzo.

### **polariz/o-filtr/ilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon kiu malpliigas aŭ nuligas reflektajn kaj respegulaĵojn.

### **polv/o/for/igo**

Tekniko kiu forigas ĝenan polvon de la sentilo pere de vibrado.

### **portret/o**

1. Bildo reprezentanta personon. 2. Agordo en fotilo (i.a. aperturo) por optimumigi la fotadon de personoj.

### **post/sinkron/igi**

Aldoni al jam registrita filmo sonojn aŭ parolojn. Aŭ registri sur la filmbend-rando novan sonon, prezentantan la parolojn en alia lingvo kaj/aŭ aldona muziko kiu subtenu la filmenhavon.

### **poŝ/fot/ilo**

Malgranda aparato kiu registras la bildojn sur milimetrojn larĝan filmon = antaŭa 110-formata fotilo.

### **pozitiv/a**

1. (P.p. bildo) Tia, ke ĝiaj nigraĵoj kaj blankaĵoj respektive respondas al tiuj de la reproduktita bildo. 2. (P.p. lenso) Tia, ke ĝi direktas la traistantajn lumradiojn al unu sama punkto = konverĝiga.

### **poz/i**

(ntr.) Alpreni kaj konservi certan teniĝon por esti fotata, desegnata, pentrata.

### **pozitiv/o**

Bildo kies nigraĵoj kaj blankaĵoj respektive respondas al la originala.

### **pres~ → vidu: print~**

Sinonima uzo laŭ PIV.

### **print/aparat/o** = printilo

Aparato per kiu oni produktas grafikan bildon.

### **print/i**

(tr.) Fari bildon sur lumsentiva surfaco per trasendo de lumo tra negativo aŭ diapozitivo.

Presi per komputila presilo.

### **print/ilo** = printaparato

Aparato per kiu oni produktas grafikan bildon.

### **print/maŝin/o**

Maŝina por aŭtomata (aŭ duonaŭtomata) printado de fotografiaĵoj.

### **print/aĵ/o**

Fotografiaĵo farita sur lumsentiva papero, plasto aŭ alia surfaco, per trasendo de lumo tra negativo aŭ diapozitivo.



### **print/paper/o**

Lumsentiva papero.

### **profil/bild/o**

Bildo uzita en retejo por identigi sin. Ne ĉiam vere estas propra foto; foje oni elektas uzi desegnaĵon anstataŭe.

### **projekci/i**

(tr.) Krei bildon sur plata aŭ kurba ebena, plejofte per optika sistemo.

### **projekci/ilo**

Aparato por projekcii (ekz. diapozitivajn) bildojn sur ekranon.

### **projekci/o**

La kreo de bildo(j) sur plata aŭ kurba ebena, plejofte per optika sistemo.

### **prokrast/o/klik/o**

Mekanismo kiu funkciigas la obturilon certan tempon (ekz. kelkajn sekundojn) post kiam oni premas la ekigan butonon, ekzemple por povi mem troviĝi en la foto.

### **proksim/bild/o**

1. Bildo de objekto aŭ persono, farita de tre proksime, tiel ke tiu aperas grande. 2. Agordo en fotilo (i.a. fokuso) por optimumigi la fotadon de laŭeble plej proksime.

### **rand/ombr/umo**

Ombro ĉirkaŭ la randoj de foto por direktigi la rigardon al la mezo de foto, kreita per tiucela fizika filtrilo aŭ per tiucela kromprogramo.

### **rand/ombr/uma filtr/ilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon (aŭ cifereca kromprogramo) por krei ombron ĉirkaŭ la randoj de foto por direktigi la rigardon al la mezo de foto.

### **rano/perspektiv/o**

De tre malalta starpunkto rigardi supren.

### **rast/rum/ero** = pikselo

Rastrumero estas unu el la multaj punktetoj (eroj) kiuj konsistigas rastruman bildon en memoro de komputilo.

### **RAW = kruda datuma formato** (Angle RAW = Raw Image Format)

Bildformato kiu enhavas ĉiujn eblajn informojn de la sensilo pri la bildo kaj ĝia ekspono.

### **reflekt/a ekran/o**

= reflekt/ilo

Surfaco servanta por cele reflekti lumon.

### **reflekt/o/fot/ilo**

Fotilo en kiu la enfokusigo okazas sur horizontala malbrila vitropeco sur kiu la bildo estas videbla. Ekzistas unuokulaj kaj duokulaj reflektofotiloj.

### **reflekt/o/panel/o**

Movebla panelo kiu reflektas (sun)lumon por plilumigi la fotatan objekton aŭ personon.

### **refrakt/i**

(tr.) Ŝanĝi je difinita angulo la direkton de lumradio, kiam ĝi trairas de unu medio en alian de malsama denseco.

## **refrakt/o**

Fenomeno per kiu radio, traŭranta du malsame densajn mediojn, devias de sia propra rekta propaga linio.

## **regul/o de trionoj**

En kompozicio, oni povas dividi foton per 2 horizontalaj kaj 2 vertikalaj imagaj linioj por loki la diversajn objektojn kiuj konsistigas la bildon. En multaj fotiloj, oni povas aperigi la helpliniojn sur la antaŭrigarda ekrano aŭ okulario.

**retfotilo** = retkamerao

Fotilo por uzo pere de interreto, kiu konekteblas al komputilo, aŭ estas integrita en portebla komputilo kaj kiu povas elsendi fotojn kaj filmojn.

## **retuŝ/i**

(tr.) Provi malaperigi detalajn nekorektaĵojn aŭ difektojn en grafika artaĵo.

## **revolv/a buton/o**

Butono per kiu oni povas returni la filmon en la kartoĉon.

## **rivel/halt/ig/aĵo**

Solvaĵo de unu aŭ pluraj acidreagantaj materialoj, uzataj tuj post la rivelado de negativoj aŭ pozitivaj, por ĉesigi la efikon de la rivelilo.

## **rivel/ban/o**

Kemia solvaĵo kiu aperigas la latentan bildon.

## **rivel/i**

(tr.) Aperigi per specialaj kemiaj banoj la latentan bildon sur la impresita tavolo de plako, filmo aŭ papero.

### **rivel/ilo**

Solvaĵo de diversaj substancoj kiu transformas la latentan bildon en videblan.

### **rivel/urn/o**

Netravebla, bone fermebla ronda ujo, en kiu rivelado de filmo povas okazi en luma ĉambro. La rivelurno estas ofte provizita per spirala kanelo laŭ kiu oni enmetas la filmon. Alia speco enhavas bendon kun tuberoj laŭ ambaŭ randoj, por distancigi la volvaĵon de la filmo.

### **ruĝ/aj okul/oj**

Ĝena kromefiko de uzado de fulmilo: la retino reflektas la lumon kaj aspektas ruĝa pro la sango en la koroido en la okulglobo.

**RVB = ruĝa-verda-blua** (angle RGB = Red-Green-Blue)

Kolormodelo uzata por adicie reprezenti kolorojn, bazita je la homa trikromata percepto de koloroj.

### **satur/eco**

La grado de intenseco de la koloroj de foto.

### **satur/igi**

Intensigi la kolorojn de foto (per programo).

**SD = sekura diĝita (cifereca)** (angle SD = Secure Digital)

Ofte uzata speco de memorkarto.

### **sek/ig/a ŝrank/o**

Aparato por la sekigo de platoj kaj filmoj.

### **sekvenc/fot/ado**

Ofte rapida kaj sinsekva farado de certa nombro de fotoj, ekz. dum sporta evento, por esti certa ke iu el la fotoj estas la dezirata bildo.

### **sekv/o/fot/i**

Per fotilo sekvi moviĝantan objekton (sportiston, aŭton) por foti ĝin laŭeble akre. Rezulte, la objekto estas akra dum la fono estas malakra.

### **sen/lum/a kamer/o**

= Malluma kamero. Fermita senluma spaco interne de fotoaparato aŭ kamerao

**sens/ilo** → sentilo

### **sentil/o**

Bildotransformilo; la kerna parto de fotilo, kiu konvertas lumon al ciferecaj informoj.

**sensor/o** → sentilo

### **sent/iv/o**

La kapablo de fotografia sentilo (aŭ molekuloj en la analoga fotografio) reagi al eĉ tre malgranda kvanto da lumo.

### **sen/viv/a /kompon/aĵ/o**

Bildo reprezentanta aranĝitajn senvivaĵojn el la naturo (fruktojn, legomojn, florojn).

### **seri/o**

Kunaĵo de pluraj fotoj kiuj rilatas unu al la alia.

### **siluet/o**

Bildo aŭ aspekto de persono aŭ objekto, vidata aŭ fotata kontraŭ la lumo, tiel ke nur la konturoj estas distingataj.

### **sinkron/a**

Okazanta samtempe.

### **sinkron/igi**

1. Fari ke du aferoj okazas ekzakte samtempe (ekz. ĉe fotilo: samtempa malfermo de la aperturo kaj funkciigo de la fulmo).
2. Fari ke du teknikaj partoj okazu en unu sama tempo: sinkronigi la bildojn kaj sonojn en filmo.

### **skatol/fot/ilo**

Malnovspeca fotoaparato en formo de rektangula skatolo.

### **sklav/a fulm/ilo**

Ekstera fulmilo kiu ekfunkcias kiam ĝi detektas la fulmon de la fotilo.

### **spedula fotilo**

Fotilo kun spegulo inter la objektivo kaj la filmo aŭ sentilo.

### **sporto**

Agordo en fotilo (i.a. aperturo) por optimumigi la fotadon de rapide moviĝantaj personoj aŭ bestoj.

### **stativ/o**

Diversmaniere alĝustigebla tripiedo por fotilo aŭ filmilo.

### **stel/difrakt/o-filtr/il/o**

Filtrilo muntebla sur la objektivon (aŭ cifereca kromprogramo) kiu difraktas la lumon tiel ke intensaj lumoj ekhavas formon de stelo.

### **stereo/diapozitiv/o**

Paro de du diapozitivoj kiuj viditaj tra stereoskopo donas imagon vidi tridimensian bildon.

### **stereo/fot/ilo**

Fotoaparato kiu registras du bildojn viditaj de diversa angulo, samtempe. Kiam oni vidas la rezulton per stereoskopo, oni havas la impreson vidi tridimensian bildon.

### **stereoskop/o**

Optika instrumento, per kiu eblas reliefe vidi la en ĝi enmetitajn bildparojn.

### **stop/ban/o**

Kemia solvaĵo por haltigi la funkcion de la rivelbano.

### **studi/o**

1. Ateliero de fotisto, ofte por foti modelojn. 2. Tuto de la laborejoj necesaj por produkti filmon, konstruitaj en unu difinita loko kaj apartenanta al unu sama firmao.

### **sub/ekspon/i**

(tr.) Ne sufiĉe longe eksponi impresiĝeman surfacon al la luma efiko, ofte por kompensi tro grandan lumintensecon.

### **substrat/o**

Glutavolo inter la lumsentiva tavolo kaj la baza tavolo de fotografa plako aŭ filmo.

### **super/ekspon/i**

(tr.) Ekstre longe eksponi impresiĝeman surfacon al la luma efiko, ofte por kompensi malgrandan lumintensecon.

### **svag/a**

= Malakra, kun malprecizaj konturoj.

### **ŝanĝ/ebla lens/o**

Objektivo malmuntebla de la fotilkorpo.

### **tele/ek/ig/ilo = distancekigilo**

Instrumento kiu funkciigas la obturilon de fotoaparato al kiu ĝi ne estas mekanike ligita.

### **telekonvert/ilo**

Ilo metita inter kamero kaj objektivo por grandigi la interfokusan distancon.

### **tele/lens/o** → Vidu: **teleobjektivo**

### **telemetr/o**

Optika instrumento por mezuri la distancon al objekto, per ĝi eblas precize enfokusigi.

### **tele/objektiv/o**

Objektivo kun relative granda fokusa distanco kaj malgranda bildangulo, uzata por ricevi pli grandan bildon ol per normala objektivo. Ĝi havas malgrandan kampoprofundon.

### **teleskop/o**



Optika instrumento por observi tre malproksimajn objektojn, precipe astrojn.

### **telestiraviadil/o**

Telestirata aviadileto aŭ flugroboto kies piloto stiras ĝin defore, i.a. uzata de armeo, polico, sekretaj servoj kaj kapabla foti kaj filmi.

**tera~ =  $10^{12}$**

Por klarigo de terabitoko aŭ terapikselo, vidu ĉe megabitoko aŭ megapikselo.

### **trikromi/o.**

Fotografa aŭ presa procedo por ricevi multkolorajn bildojn per la kunmeto de la tri fundamentaj koloroj (ruĝo, verdo, bluo).

### **truk/i**

(tr.) Aranĝi foton aŭ filmon per artifika procedo aŭ por doni ŝajnon de realo – aŭ por akiri specialan rezulton.

### **truk/o**

Artifiko uzata en filmo- aŭ foto-farado por fari korekton aŭ por misgvidi spektanton, donante ŝajnon de realo.

### **truk/ado**

La modifo de bildo, kutime per programo por retuŝi ĝin aŭ por atingi specialan rezulton. Ofte uzata tekniko en modo kaj reklamo por plibeligi virinojn kaj la komercajn varojn.

**TTL = tra la lenso** (angle: TLL = Through The Lense)

Tekniko kiu ebligas prezenti antaŭrigardon rekte tra la lenso kaj ne tra alia vojo por optimuma precizeco.

### **tuj/fot/il/o**

Aparato kiu permesas rapide kaj senpere produkti pozitivan bildon, nigra/blankan aŭ koloran.

### **tuj/fot/o**

Foto videbla (preskaŭ) tuj post ĝia farado. En analoga fotografio, la rivelilo estis pakita kun la fotopapero por povi surloke videbligi la foton (Polaroid-procedo).

### **tuj/montr/o**

Funkcio de bitfotilo kiu dum fotado permesas tuj ("vive") antaŭrigardi la farotan foton per la ekrano de la fotilo.

### **USB = universala seria buso**

USB estas interfacio kiu permesas konekti flankaparatojn al komputilo, ekz. fotilon.

### **UV**

Ultraviola.

### **UV-filtrilo**

Filtrilo muntebla sur la objektivon kiu malpliigas aŭ nuligas ultraviolan lumon.

### **vari/ig/ebla kontrast-papero**

(Foto)papero kun variigebla kontrasto, realigebla per diversaj filtriloj, ĝenerale ne sentema je ruĝa lumo.

**VDR = vast-detala registrado** (Angle HDR = High Dynamic Range)

Metodo por registri detalplenan bildon ĉe ekstreme larĝa zono de lumintenso, alivorte: registro de detaloj kaj en helaj kaj en malhelaj partoj de foto.

**vide/o**

Elektronika registrado kaj reproduktado de bildoj.

**volv/buton/o**

Butono per kiu oni povas turni aŭ returni la filmbobenon en la fotoaparato.

**zom/i**

(ntr.) Adapti la interfokusan distancon.

**zom/lens/o**

Lenso kun adaptebla interfokusa distanco.

### **Aldono 1:** anglaj mallongigoj kun ilia Esperantotraduko

Listo de internacie uzataj mallongigoj kiuj NE estas la samaj kiel la esperantaj mallongigoj. Ĉiuj terminoj venas el la angla lingvo, krom DIN, kiu venas el la germana.

<b>Angle</b>	<b>Esperante</b>
<b>CMYK</b> = Cyan, Magenta, Yellow, Key / Black	<b>CMFN</b> = Cejana, Magenta, Flava, Nigra
<b>DPI</b> = Dots per inch	<b>PEC</b> = Punktoj en colo
<b>HDR</b> = High Dynamic Range	<b>VDR</b> = Vast-Detala Registrado
<b>RGD</b> = Red-Green-Blue	<b>RVB</b> = Ruĝa-verda-blua

## Aldono 2: partoj de fotilo

